

---

# Takso de interreta instruado al franclingvaj lernantoj per la KER-sistemo

Post kiom da horoj de lernado de Esperanto  
oni atingas la nivelon A1 aŭ A2?

*Eseo verkita de Emmanuelle RICHARD kaj Axel ROUSSEAU*

*Decembro 2024*

---

*“Esperanto estas dekoble pli facile lernebla ol aliaj lingvoj. Cent horoj de Esperanto-instruado ekvivalentas 700 horojn da itala instruado, 1000 horojn da angla instruado kaj 1200 horojn da germana instruado.”*

Tiajn asertojn ni ofte aŭdis dum ni lernis Esperanton, kaj kiel fervoraj subtenantoj, ni multe reklamis pri Esperanto uzante tiajn argumentojn.

Sed ĉu tia aserto estas efektive vera? Sendube, ni opinias, ke Esperanto estas (pli) facile lernebla lingvo. Ni mem spertis tion dum nia lernado, kaj poste, instruante ĝin al komencantoj, ni ofte rimarkis, ke multaj el ili rapide partoprenis en kongresoj kaj internaciaj renkontiĝoj. Tial ni emas konkludi, ke Esperanto estas pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj.

Tamen, kvankam tiuj spertoj estas interesaj, ili ne sufiĉas por starigi objektivan komparon pri la facileco de Esperanto kompare kun aliaj lingvoj. Por esplori tiun demandon laŭ scienca metodologio, necesas uzi normigitajn mezurilojn. Bonŝance, en la lastaj jaroj aperis la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KER), kiu ebligas kompari lingvokompetentecajn nivelojn en Esperanto kun tiuj en aliaj lingvoj.

Kiom da horoj oni efektive bezonas por atingi la nivelojn A1 kaj A2 en Esperanto? Kiom pli rapide oni povas atingi tiujn nivelojn en Esperanto, kompare kun aliaj lingvoj? Tiu ĉi esploro celas respondi al tiuj demandoj.

En tiu ĉi esploro, ni fokusiĝas pri la niveloj A1 kaj A2. Unuflanke, la esploro baziĝas sur statistikaj datumoj, kiujn ni kolektis dum proksimume du jaroj. Aliflanke, la nivelo A2 reprezentas elementan kapablon komuniki: je tiu nivelo, oni povas sufiĉe bone komuniki kaj kompreni aliajn pri bazaj ĉiutagaj temoj.

La kadro de tiu ĉi esploro estas klare difinita: temas ekskluzive pri franclingvanoj, kiuj sekvis la retajn kursojn de Esperanto-France. La lernantoj havas diversajn profilojn, tamen plejparte temas pri plenkreskuloj kaj adoleskantoj, kiuj jam lernis almenaŭ unu fremdan lingvon en lernejo.

Gravas menci, ke tiu ĉi esploro ne celas pruvi, ke Esperanto faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, kiel sugestis aliaj studoj, sed kompari la lernorapidecon de Esperanto kun tiu de aliaj lingvoj.

En la unua sekcio de tiu ĉi dokumento, ni prezentos la kursojn, kiuj konsistigis la fundamenton de nia esploro. Ni detale priskribos la devenon de tiuj kursoj, ilian evoluon, kaj la enkondukitajn ekzamenojn je la niveloj A1 kaj A2. Poste, ni klarigos la statistikan metodologion uzitan por taksu la kompetencojn de la lernantoj kaj la tempon uzatan por kompletigi la kurson. Poste ni analizos la rezultojn kaj komparos ilin kun rezultoj de aliaj lingvokursoj, kiuj celas atingi la A1-kaj A2-nivelojn. Tiam ni povos proponi konkretajn plibonigojn.

## Prezento de la aŭtoroj

Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau konatiĝis en 2003. Axel zorgis pri la interreta kurso “ikurso” (kiu estas la ĉefa temo de tiu ĉi eseo) kaj Emmanuelle estis tiam lernantino. Ambaŭ profesie laboras kiel komputilistoj. De tiam ili kunlaboris por diversaj projektoj de Esperantaj asocioj. Unue por Espéranto-Jeunes (JEFO), la junulara esperanta asocio en Francio, kaj poste ĉe Espéranto-France (UFE), la nacia esperanta asocio. El la projektoj, ni povas listigi:

- Samopiniuloj<sup>1</sup>, ludo por riĉigi la vortprovizon en Esperanto
- Farbskatol', iu preparenco de YouTube<sup>2</sup>
- Eldono de komiksoj kiel *Gastono Lafuŝ'*, *La Eta Spiru*, *Ĉiuj superherooj*.
- Eldono de lernolibroj kiel *Metodo 11*<sup>3</sup>, *Stranga Malapero*<sup>4</sup>, nova eldono de *L'espéranto par la méthode directe* (franca eldono) de Stano Marček

Ili ne spertas pri traduko sed ŝategas kunordigi projektojn, rilati kun kopirajtposedantoj kaj presistoj, ktp.

## Prezento de la kursoj

En tiu ĉi parto, ni prezentos du retajn kursojn proponitajn de la asocio Espéranto-France:

- La unua kurso, titolita “dek-leciona kurso” (ĉi-poste nomata DLEK), celas instrui Esperanton al komencantoj, ebligante ilin akiri fundamentajn lingvokapablojn, kiuj proksimume respondas al la nivelo A1 de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj (KER).
- La dua kurso, *Gerda malaperis*, bazita sur la samnoma verko de Claude Piron, celas progresigi la lernantojn, kiuj jam havas bazan lingvoscion.

Multaj lernintoj, kiuj sukcese finis la DLEK-kurson, daŭrigas sian lernadon per la kurso *Gerda malaperis*.

---

<sup>1</sup> <https://samopiniuloj.esperanto-jeunes.org/>

<sup>2</sup> <https://eo.wikipedia.org/wiki/Farbskatol'>

<sup>3</sup> <https://metodo11.esperanto-france.org/>

<sup>4</sup> <https://facilaj-rakontoj.esperanto-france.org/>

## Enhavo

Komparo de diversaj instrumetodoj de Esperanto .....	4
Historio de la kursoj .....	4
Enhavo de la kursoj .....	5
La dekleciana kurso .....	5
La kurso Gerda malaperis .....	6
Korektado de la ekzercoj .....	7
“Homa” korektado: trajtoj kaj avantaĝoj .....	7
Aŭtomata korektado .....	8
La KER-ekzamenoj .....	9
Enkonduko .....	9
Nuna stato de la KER-ekzamenoj por Esperanto .....	9
Lingvokapabloj por la niveloj A1 kaj A2 .....	10
Kiel taksi la nivelon atingeblan post la retaj kursoj? .....	10
Lingvokapabloj .....	10
Kiel adapti la kursojn por atingi tiujn kapablojn .....	12
Realigo de la ekzamenoj .....	13
Prepara laboro .....	13
Kiel provizi poentojn plej juste? .....	13
Statistika analizo de la lernoprocezo .....	15
Bezonata tempo por finstudi la kursojn .....	15
Evoluo de la nombro da lernantoj laŭ la jaroj .....	17
Taksado de la ekzamenado .....	18
Analizo de la rezultoj .....	20
Komparo de la tempo bezonata por atingi la nivelojn A1 kaj A2 .....	20
Komparo de la sukceso en la ekzamenoj .....	21
Konkludo kaj onta perspektivo .....	22
Komparo de Esperanto kun aliaj lingvoj .....	22
Kiel plibonigi niajn kursojn .....	23
Pedagogiaj plibonigoj .....	23
Apendico: Lerta metodo por realigo de projektoj .....	25
La uzantoj scias kion ili bezonas .....	25
Ne perfekta tuj, sed uzebla unue .....	25
Listigi ĉiujn ideojn, elekti la plej utilajn unue .....	25
Bibliografio / Eksteraj ligiloj .....	26

# Komparo de diversaj instrumetodoj de Esperanto

Dum la dudeka jarcento, lingva instruado signife progresis kaj evoluis. Diversaj metodoj aperis, kreiĝis, kaj ni ŝatus prezenti kvar el la plej gravaj (vidu ankaŭ [\[RITE\]](#) kaj [\[Manlibro pri instruado de Esperanto\]](#)).

**La gramatika-traduka metodo** estis dum jarcentoj la tradicia aliro al lingvolernado. En tiu ĉi metodo, la instruisto sisteme klarigas la gramatikajn regulojn, kaj la lernantoj praktikas per tradukaj ekzercoj en ambaŭ direktoj. Nia DLEK-kurso origine baziĝis sur tiu ĉi metodo.

**La rekta metodo**, disvastigita de Andreo Cseh, uzas nur Esperanton kiel instrulingvon por krei naturan kaj rektan lernomedion, per kiu Cseh sukcesis instrui la lingvon al centoj da lernantoj, kiuj ne havis komunan lingvon.

**La aŭda-vida metodo** baziĝas ĉefe sur aŭda kompreno kaj parola ripetado.

**La situacia-komunika aliro** estas la plej fama metodo en la nuna epoko. Ĝi baziĝas sur aŭtentaj kaj realaj komunikaj situacioj. Ĝi estas, laŭ ni, trafinda celo por nia kurso.

## Historio de la kursoj

Esperanto-France proponas retajn kursojn ekde la 1990-aj jaroj. Komence, tiuj kursoj konsistis el aro da paĝoj kun tekstoj kaj demandoj, tamen post enketo, ni malkovris, ke la DLEK-kurso jam ekzistis antaŭ longa tempo kaj ĝi verŝajne baziĝis sur lernolibro eldonita en 1911, kvankam ni nek trovis ĝian fonton nek ricevis konfirmon pri tio.

Tiuj, kiuj deziras eklerni per tiuj kursoj povas aliĝi al senpaga korektada servo, kie korektanto akompanas ilin per retpoŝta interrilato.

Kelkaj administrantoj zorgis pri la skipo de volontuloj: ili interalie atribuis korektanton al ĉiu nova lernanto kaj sendis gratulan leteron kaj atestilon al tiuj, kiuj sukcese kompletigis la kurson.

En 2003, ni kreis novan sistemon por aŭtomate atribui korektanton al ĉiu lernanto, unue por la dek-leciona kurso kaj poste por la kurso *Gerda malaperis*. Samtempe, ni renovigis la fasadon de la retejo, aldonis mastrumpanelon por la korektantoj kaj ni enkondukis statistikajn datumojn pri la lernoprogreso.

En 2016, ni konstruis tute novan version de la retejo, adaptante la uzant-interfacon al pli modernaj teknikoj por plibonigi ĝian uzeblon sur diversaj aparatoj kiel komputiloj, saĝtelefonoj kaj tabulkomputiloj, ebligante pli facilan kaj agrablan uzadon.

Kiel komputilistoj, ni kutimas labori uzante “lertan” metodologion (Agile Method). Tiu ĉi metodologio permesas flekseman kaj ripetitan aliron al projektado, kiu akcelas la produktadon kaj plibonigas la komunikadon inter skipoj. La ĉefaj principoj de la “lerta” metodologio fokusiĝas sur adaptemo, kunlaborado kaj konstanta plibonigo. En la apendico, ni prezentas la ĉefajn principojn de tiu ĉi metodo kaj kiel ni uzis ĝin.

Dum ni konstruis novan version de la retkursoj, ni iom post iom plibonigis ties enhavon kaj aspekton, inkluzive per:

- **Sistemaj ripetoj** (“spaced repetition”). Tiu ĉi ilo helpas lernantojn memori vortojn. La programo proponas la memorendajn vortojn, kaj se la lernanto konas ilin, ili reaperos post 1 tago (kaj poste, post 2, 4 kaj 8 tagoj). Se la lernanto tajpas malĝustan tradukon de iu vorto, la programo ree demandos la vorton pli ofte. La intervalo inter la ripetoj dependas de kiom ofte la lernanto ĝuste respondas.
- **Duon-aŭtomata korektado**. Tiu ĉi ilo funkcias por iuj ekzercoj, donante rapidajn informojn al la lernanto, ĉu li aŭ ŝi komprenis la ekzercon. Kiam la respondo estas ĝusta, la programo verde substrekas ĝin. Kelkaj ekzercoj, kiel verkado, restas plene mane korektotaj. Fine, se la lernanto ne sukcesas verdigi siajn respondojn, li aŭ ŝi povas sendi la ekzercon al sia korektanto, kiu klarigos la eraron.
- **Kulturaj informoj**. Dum sia progreso, la lernanto regule ricevas retmesaĝojn kun informoj pri diversaj aspektoj de Esperanto kiel denaskuloj, kongresoj, literaturo, ktp. Nuntempe, 23 diversaj mesaĝoj estas disponeblaj en nia sistemo.
- **Informoj pri kiel plu lerni**. Ni aldonis al la retejo diversajn informojn por helpi la lernantojn daŭre lerni kaj praktiki la lingvon post la kursoj. Pliaj detaloj estas disponeblaj ĉe <https://ikurso.esperanto-france.org/helpo.php?section=kajposte>

## Enhavo de la kursoj

### La dekleciana kurso

#### ○ *Origino kaj evoluo de la kurso*

La dekleciana kurso (DLEK) instruas bazajn konojn de Esperanto al komencantoj, por ke ili povu rapide komuniki kaj poste plu lerni kaj praktiki. Origine, temis pri perkorespinda kurso por anglalingvanoj, kiu poste estis adaptita por franclingvanoj. Pli poste la Kebeka Esperanto-Societo (ESK) adaptis ĝin al reta kurso.

Fine de la 1990-aj jaroj, francaj esperantistoj enretigis tiun ĉi kurson kaj skipo de korektantoj komencis senpage helpi la lernantojn.

En 2016, ni enretigis reviziitan version de la kurso. Kaj kvankam teknikaj kaj pedagogiaj plibonigoj estis enkondukitaj, la kurso konservis siajn originalajn principojn de simpleco kaj efikeco.

#### ○ *Metodologio*

La kurso estas bazita sur la gramatika-traduka metodo, kie oni unue instruas la gramatikajn regulojn, kaj la lernantoj praktikas per ekzercoj, precipe tradukoj de aŭ al Esperanto. Estas notinde, ke la kurso estas prezentita en la gepatra lingvo de la lernantoj. Krome, la kurso prezentas tekstojn kaj dialogojn kiel ilojn por enkonduki novajn vortojn. Tia kurso estas ĉefe skriba. Tial ĝi estis facile adaptebla al korespinda kurso, kaj poste al reta kurso. En la lasta versio de la kurso, kiu estas nun en <https://ikurso.esperanto-france.org/>, nova materialo estis aldonita, kiel filmetoj, por helpi la lernantojn rapide alkutimiĝi al aŭdo de la parolata lingvo.

○ *Vortprovizo*

La DLEK-kurso instruas ĉirkaŭ 500 vortojn, kiuj estas proksimume je la sama nivelo kiel la vortprovizo de aliaj bazaj Esperanto-kursoj kiel *Metodo11*, bazita sur la Zagreba metodo, kiu enhavas ĉirkaŭ 680 vortojn, kaj la reta kurso *Esperanto en 12 lecionoj*<sup>5</sup>, ankaŭ bazita sur la Zagreba Metodo. Tia vortlisto estas iomete pli ol la duono de la baza vortlisto "UEA facila" uzata de la revuo *Kontakto* kaj de la retejo <https://uea.facila.org/>

○ *Ekzercoj kaj pedagogiaj metodoj*

La DLEK-kurso proponas diverstipajn ekzercojn, ĉiuj postulantaj skriban respondon: plurelektaj demandoj, tradukoj, respondoj al specifaj demandoj (ĉu per simpla jes/ne ĉu per detala respondo), kompletigaj teksto-analizoj, libera verkado, ktp.

La ekzercoj ofte fokusiĝas pri gramatikaj konceptoj, sed la kurso proponas ankaŭ taskojn pri skriba komprenado (demandoj pri teksto) kaj aŭda komprenado (demandoj pri registritaj voĉoj).

La enkonduko de aŭda kompreno estas sufiĉe nova en la kurso kaj ankoraŭ malofta. En la unuaj versioj de la kurso, tiaj ekzercoj tute mankis, tamen ni komencis enkonduki ilin, eĉ ekde la unua leciono. Fine de tiu ĉi leciono, la lernanto devas spekti filmeton, en kiu pluraj esperantistoj prezentas sin. Tio ebligas al la lernanto aŭdi aŭtentikajn Esperantajn voĉojn, al kutimiĝi al la ritmo de la lingvo kaj tiel konstati, ke ne necesas kompreni ĉiun vorton por kompreni, pri kio temas.

La kurso do nun kombinas tradiciajn pedagogiajn metodojn kun nuntempa plurmedia aliro, kreante pli kompletan kaj efikan lingvolernan sperton.

## La kurso Gerda malaperis

○ *Fonto de la kurso*

Tiu ĉi kurso estas bazita sur la pedagogia romano de Claude Piron, *Gerda malaperis*, verkita por komencintoj kaj metodike prilaborita por enkonduki iom post iom novajn vortojn. Ĉiu el la 25 ĉapitroj de la libro konsistas el kvin partoj: ĉefa rakonto, gramatikaj klarigoj, vortlistoj, praktikaj ekzercoj kaj aldona rakonto *Lasu min paroli plu*. Tiu ĉi kroma teksto uzas la saman vortprovizon kiel la ĉefa rakonto, ebligante la lernanton memori la vortojn en nova kunteksto, ĝuante novan rakonton.

Esperanto-France disponigas la kurson *Gerda malaperis* ankaŭ en la retejo [ikurso.esperanto-france.org](http://ikurso.esperanto-france.org)

Kun la konsento de la skipo de lernu.net, ni ilustris la kurson per la samaj desegnoj kiel en lernu.net. Ni aldonis ankaŭ son-registraĵojn por la unuaj lecionoj. Poste aliaj registraĵoj estis aldonitaj – kaj plu estos aldonitaj – dank' al la helpo de pluraj volontuloj.

○ *Metodologio*

Kvankam la kurso *Gerda malaperis* sekvas la bazajn principojn de la dekleciana kurso, ĝi distingiĝas per pli forta emfazo je skriba produktado. Estas ankaŭ ekzercoj pri gramatiko aŭ vortprovizo, en kiuj estas ĝenerale nur unu respondo por ĉiu demando. La klarigoj pri

---

<sup>5</sup> <https://esperanto12.net>

gramatiko estas en la franca, tamen la kurso invitas la lernantojn praktiki la lingvon, respondante pli longe al serioj da demandoj pri la teksto kaj skribante kiel eble plej ofte en Esperanto.

Gravas la rolo de la korektantoj: ili estas instigitaj uzi Esperanton kiel ekskluzivan komunikilon en siaj rilatoj kun la lernantoj, tiel kreante plenan lingvan mergiĝon.

- *Vortprovizo*

Tiu kurso enkondukas pliajn 700 novajn vortojn. Entute, estas 1200 vortoj, kun la vortoj lernitaj en la DLEK-kurso. Ĉiuj novaj vortoj kaj gramatikaj elementoj estas prezentitaj kun franclingvaj tradukoj kaj klarigoj.

- *Ekzercoj*

La ekzercaro fokusiĝas je du ĉefaj kampoj: tekst-kompreno pere de celitaj demandoj kaj praktikado de novaj gramatikaj strukturoj kaj vortoj.

Estas notinde, ke tiu ĉi kurso ne inkluzivas tradukajn ekzercojn, privilegiante rektan lingvouzon en Esperanto.

## Korektado de la ekzercoj

Retaj kursoj prezentas signifan avantaĝon: la eblecon por la lernantoj sekvi la instruadon laŭ propra ritmo kaj fleksebla horaro. Tamen, tiu memstara lernado ne implicas izolitecon. Ekzistas diversaj rimedoj por helpi lernantojn, por klarigi punktojn, kiujn ili ne plene komprenis, por provizi pliajn informojn pri la enhavo de la kurso aŭ pli ĝenerale pri la esperanta movado kaj diversaj eventoj, kiuj povus interesi ilin.

En tiu sekcio, ni pritraktos pli detale la korektadon de ekzercoj. Ekde la komenco, ni ebligis al volontuloj korekti la ekzercojn, sed nuntempe certaj ekzercoj povas esti aŭtomate korektitaj. Sekve, en 2017, ni enkondukis aŭtomatan korektadon por iuj ekzercoj.

### “Homa” korektado: trajtoj kaj avantaĝoj

La homa korektada sistemo, enkondukita en la 1990-aj jaroj, asignas personan korektanton al ĉiu petanta lernanto. En la fruaj jaroj, la atribuo de korektanto estis farata de administrantoj, sed la nuna sistemo aŭtomate atribuas korektanton al nova lernanto laŭ du ĉefaj kriterioj: respekto de la maksimuma lernanto-nombro por ĉiu korektanto kaj de la geografia proksimeco. Kiam eblas, la sistemo atribuas korektanton de la sama regiono.

avantaĝoj	malavantaĝoj
Homaj korektantoj ne nur provizas ĝustajn respondojn kaj poentojn, sed ankaŭ, per siaj konsiloj, donas informojn pri la esperanta movado kaj eventoj en la regiono. La korektanto do ludas rolon de ligilo inter la lernanto kaj la movado.	Kiam lernanto kompletigis ĉiujn ekzercojn de iu leciono, li aŭ ŝi sendas ilin al sia korektanto. Kvankam korektantoj kutime respondas rapide (ofte ene de unu aŭ du tagoj), dum la lernanto atendas la korektaĵojn, li aŭ ŝi ne scias, ĉu la respondoj

<p>Krome, ĉar la sama korektanto sekvas lernanton de la unua ĝis la lasta leciono, estas pli facile sekvi la progreson de la lernanto kaj krei amikan rilaton. Tio ofte instigas lernantojn esprimi sin en Esperanto pri diversaj temoj, krom la taskoj de la kurso. La rilato ankaŭ malhelpas la emon forlasi la lernadon.</p>	<p>estis ĝustaj kaj ĉu li aŭ ŝi jam regas la lastatempan lecionon.</p> <p>Por la korektanto, tiu ĉi procezo povas postuli tempon, precipe kiam temas pri bazaj ekzercoj, kiuj ne bezonas pliajn klarigojn.</p>
---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------	----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

Tial ni decidis esplori metodojn por parte aŭtomatigi la procezon, tiel ke la lernanto ricevu pli rapidajn korektojn kaj samtempe por ke la laboro de la korektantoj estu malpezigita, ebligante al ili koncentriĝi pri taskoj, kiuj postulas homan kompetentecon kaj pli nuancajn klarigojn.

### Aŭtomata korektado

Por certaj tipoj de ekzercoj, kie ekzistas nur unu ĝusta respondo aŭ tre limigita nombro da eblaj respondoj, ni enkondukis sistemon de aŭtomata korektado, por plifaciligi kaj plirapidigi la korektadon.

avantaĝoj	malavantaĝoj
<p>Unue, aŭtomata korektado ebligas tuj informi la lernanton pri ĝusteco aŭ malĝusteco de liaj aŭ ŝiaj respondoj. Tiel la lernanto povas tuj kontroli kaj korekti erarojn, kio favoras aktivan lernadon kaj plibonigas memstaran kontroladon.</p> <p>Due, tia sistemo ebligas al la korektantoj pli facile kaj rapide pritrakti la respondojn, kiuj bezonas klarigojn.</p>	<p>Kiel ni vidis, aŭtomata korektado ne taŭgas por ĉiuj tipoj de ekzercoj. En taskoj kie eblas diversaj ĝustaj respondoj, la sistemo foje ne rekonas iun alternativan ĝustan respondon, kio povas konfuzi la lernanton kaj konduki al senbezona korektoj de jam ĝustaj respondoj.</p> <p>Antaŭvidinte tiun riskon, ni aldonis noton en ĉiu paĝo por klarigi al la lernanto, ke aŭtomata sistemo ne estas perfekta. Ni rimarkis ke, de tempo al tempo, tio povas malkuraĝigi la lernanton, kiu ne trovis ĉiujn ĝustajn respondojn kaj tiam uzas tro multe da tempo por trovi ĉiujn ĝustajn respondojn. Tio povas kaŭzi frustriĝon kaj tiel malhelpi efikan memoradon kaj lernadon.</p>

# La KER-ekzamenoj

## Enkonduko

KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) estas konata ankaŭ en la franca kiel CECRL (Cadre européen commun de référence pour les langues) aŭ en la angla kiel CEFR (Common European Framework of Reference for Languages).

Tiun referenckadron ellaboris la Konsilio de Eŭropo en 2001.

La celo de tiu kadro estas priskribi atingojn por lernantoj de fremdaj lingvoj. La sistemo estas dividita en 6 nivelojn: A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2. Por ĉiu nivelo la sistemo detalas kiujn kompetentojn lernantoj devas akiri, priskribante ilin per konkretaj kapabloj, ekzemple kiel prezenti sin, paroli pri iu temo, raporti pri iu afero, ktp.

A1 kaj A2 estas baznivelaj, B1 kaj B2 karakterizas memstarajn lingvo-uzantojn, C1 kaj C2 estas profesinivelaj.

Laŭ tiu sistemo, en Francio, A1 estas atingebla fine de bazlernejo, A2, post du jaroj en mezlernejoj, kaj B2 estas la nivelo, kiun devas atingi junuloj fine de la liceo.

## Nuna stato de la KER-ekzamenoj por Esperanto

KER-ekzamenoj ekzistas por Esperanto ekde decembro 2008, sed ne por ĉiuj niveloj. Nuntempe, eblas trapasi tiun ekzamenon por la niveloj B1, B2, C1 kaj C2.

Ekzamenoj de Esperanto ne estas novaj: oni ne atendis la KER-sistemon por organizi ekzamenojn, tamen KER-ekzamenoj estas novaj, konsiderante ke en tiu sistemo pluraj kompetentoj estas taksataj, do ne nur skribaj sed ankaŭ parolaj. Plie la gepatra lingvo de la ekzamenato ne estas uzata, do tiuj ekzamenoj enhavas neniun tradukan ekzercon.

La niveloj A1 kaj A2 de la KER-sistemo ne ekzistas en Esperanto, do ne eblas taksi per tia ekzameno la nivelon de lerninto, kiu ĵus finis bazan kurson de Esperanto, krom per alia tipo de ekzameno.

Krom taksi la personajn kompetentojn de lernantoj, ekzamenoj povas, se oni konsideras ilin je pli larĝa skalo, doni interesajn informojn pri la nivelo atingebla post kelka tempo da lernado, kompare kun la lernado de aliaj lingvoj.

Por aliaj lingvoj, ekzemple por lerni la anglan aŭ la francan, tio reprezentas ĉirkaŭ 100 ĝis 120 horojn da lecionoj por atingi la nivelon A1 kaj entute 300 ĝis 360 horojn da lecionoj por atingi la nivelon A2. La tempo bezonata por atingi tiujn nivelojn dependas ne nur de la lernantoj kaj de lia/ŝia motivo sed ankaŭ de la intenseco de la kursoj. Lernantoj, kiuj sekvas intensajn lecionajn sesiojn (ekzemple 3 horojn ĉiutage) bezonos malpli da horoj entute ol lernantoj, kiuj studas nur 3 horojn semajne.

## Lingvokapabloj por la niveloj A1 kaj A2

La sistemo priskribas ĉiun nivelon per listo de praktikaj kapabloj.

### A1

La lingvo-uzanto kapablas komuniki en simpla maniero, se la interparolanto malrapide parolas kaj estas helpema. Tipaj situacioj estas ekzemple “Mi komprenas simplajn demandojn kaj vortojn rilatajn al mia kutima medio, kiam homoj parolas malrapide. Mi kapablas skribi mallongan tekston kiel bildkarton, formularon, ktp.”

### A2

La lingvo-uzanto kapablas interŝanĝi pri simplaj informoj, pri konataj kaj rutinaj temoj. Tipaj situacioj estas ekzemple: “Mi komprenas parolajn kaj skribajn komunikadojn kun tre ofta vortprovizo. Mi komprenas la ĉefan signifon de anoncoj kaj mesaĝoj. Mi kapablas komuniki per simplaj kaj rektaj informoj, tamen estas malfacile por mi daŭrigi interparoladon.”

## Kiel taksi la nivelon atingeblan post la retaj kursoj?

Sciante, ke KER-ekzamenoj en Esperanto ekzistas nur ekde la nivelo B1, kaj ke ĝenerale homoj povas sufiĉe rapide atingi bonan nivelon en Esperanto, oni povus opinii, ke ne valoras organizi ekzamenojn de Esperanto je la bazaj niveloj A1 kaj A2.

Tamen, eĉ se iuj kapablas, en unu lerneja jaro, sukcese trapasi C1-ekzamenon de Esperanto, ne ĉiuj lernas samrapide, kaj do povas esti interese por ili havi okazon trapasi baznivelaĵajn ekzamenojn, kaj tiam taksu sian nivelon sen atendi longon, kaj tial resti motivataj.

Por ni, la unua demando estis: kiun nivelon povas atingi la lernantoj de niaj retaj kursoj? Niaj statistikoj donas indikon pri la nombro da horoj uzataj por plenumi ĉiun kurson. Se la lernantoj trapasas KER-ekzamenon fine de ĉiu kurso, tiam estus facile kompari kiom da tempo oni bezonas por atingi iun nivelon por Esperanto kaj por alia fremda lingvo.

Laŭ niaj statistikoj, lernantoj averaĝe finas la unuan retan kurson post 38 horoj.

La dekleciana kurso enkondukas ĉiujn bazajn nociojn de la lingvo kaj ĝenerale, fine de la kurso, lernantoj kapablas skribi mallongajn tekstojn en Esperanto por paroli pri sia vivo aŭ pri kutimaj aferoj. Tial ni opiniis, ke post la unua kurso, ni povas proponi ekzamenon je A1-nivelo.

En la kurso *Gerda malaperis*, kiun lernantoj studas post la DLEK-kurso, oni instigas la lernantojn interrilati kun sia korektanto en Esperanto. Iom post iom la lernantoj alkutimiĝas esprimi sin per pli kompleksaj frazoj, pri diversaj temoj rilate al la tekstoj de la kurso aŭ aliaj aferoj. Tial ni pensis, ke estus bone proponi la A2-nivelan ekzamenon fine de la kurso.

## Lingvokapabloj

Jen listo de komunikaj celoj, laŭteme, atingendaj por la nivelo A1 kaj A2 (el Duolingo University<sup>6</sup>).

---

<sup>6</sup> Temas pri kursoj por kontribuantoj de Duolingo. Tiam kurson ni sekvis, kiam ni kunlaboris por starigi la kurson de Esperanto por franclingvanoj.

### **A1-nivelo**

1. Saluti kaj adiaŭi
2. Danki, pardoni (ĝentilaj vortoj kaj esprimoj)
3. Doni personajn detalojn (nomo, adreso, devenloko, aĝo, edukado, profesio)
4. Paroli pri familio
5. Priskribi homojn (fizika aspekto, vestaĵoj, ktp.)
6. Priskribi hejmojn
7. Esprimi ŝatojn, malŝatojn, bezonon kaj deziron
8. Esprimi emociajn statojn (feliĉo, ekscito, malĝojo)
9. Esprimi fizikajn statojn (esti malsata, malvarma, varma)
10. Fari aĉetojn (nombroj kaj prezoj)
11. Mendi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn
12. Libertempaj agadoj, socia vivo, ferioj
13. Priskribi kutimojn kaj rutinojn
14. Diri la tempon
15. Semajntagoj, monatoj, sezonoj, datoj (ordinaraj nombroj)
16. Vetero
17. Vojaĝo- kaj servo-vortprovizo, farante aranĝojn (biletoj, rezervoj, ktp.)
18. Bazaj direktoj
19. Paroli pri la estonteco, farante planojn
20. Paroli pri la pasinteco (simplaj eventoj kaj ĝeneralaj statoj)

### **A2-nivelo**

1. Priskribi homojn (fizika priskribo, personeco), iliajn kredojn, ŝatojn kaj sentojn, familiaj rilatoj, ktp.
2. Lernejo kaj edukado
3. Labora kaj profesia vivo
4. Priskribi aferojn
5. Priskribi lokojn
6. Priskribi kie estas lokoj kaj aferoj
7. Fari aĉetojn
8. Mendi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn
9. Esprimi devon, neceson, sugestojn, doni konsilojn, fari petojn, oferti, helpi
10. Invitoj, aranĝoj por renkonti homojn
11. Libertempaj agadoj, socia vivo, ferioj, priskribo de kutimoj kaj rutinoj (en nuna kaj pasinta)
12. Sano kaj korpa zorgo
13. Vojaĝo kaj servoj vortprovizo
14. Priskribi pasintajn spertojn & rakontadon

La nivelo A2 enhavas komunajn temojn kun la nivelo A1 sed en la nivelo A2, la lernantoj devus kapabli paroli pri la samaj temoj en pli detala kaj kompleksa maniero.

Tiuj komunikaj celoj ebligas trovi temojn por verki ekzercojn.


## Kiel adapti la kursojn por atingi tiujn kapablojn

A1-ekzameno taksas la kapablojn de lernintoj je tiuj kampoj: skriba kompreno, aŭda kompreno, skriba produktado kaj parola produktado.

Nia reta sistemo ne ebligas taksati la parolan produktadon, kiel oni povus fari en veraj ekzamenoj, do ni kreis ekzamenon por la tri unuaj kapabloj.

Ni jam diris, ke je la komenco, la kurso ĉefe instruis skriban komprenon kaj skriban produktadon, sed ĉar lingvo estas ankaŭ – kaj eĉ foje ĉefe – parolata, estas grave, ke la kurso proponu taskojn, por trejni la lernantojn al aŭda kompreno kaj, se eblas, al parola produktado – sed tiu lasta kapablo postulas alian tipon de organizado, por ke lernantoj kaj instruistoj povu renkontiĝi kaj interparoli.

Estas tamen sufiĉe facile, eĉ en la kadro de la jam ekzistantaj kursoj, proponi taskojn, por ebligi la lernantojn trejniĝi al aŭda kapablo. Ekzemple, ni proponas tian ekzercon fine de la unua leciono; en filmeto pluraj esperantistoj prezentas sin, kaj post spektado (plurfoje se necesas), la lernanto devas respondi simplajn demandojn kiel “Kiu estas ...?”



Ekzerco #1 - Cours en 10 leçons d'es...  
A regarder ... Partager

Regarder sur YouTube

**Question 1/10 :**

En kiu filmo estas Aleks?

- filmo 1
- filmo 2
- filmo 3
- filmo 4
- filmo 5

Vi povas spekti la filmon kaj provi respondi:

<https://ikurso.esperanto-france.org/fr/cge/lec01.php?section=8>

Alia tipo de ekzerco, kiun ni planas enkonduki en la kurso, estas ekzerco, kiu ebligas la lernanton malkovri novajn regulojn farante taskon. Anstataŭ doni la regulojn, oni instigas la lernantojn trovi tiujn regulojn per facilaj ekzercoj.

Ekzemple, komence de la kurso, estus facile malkovrigi la nombrojn al la lernanto: se ni proponas liston da nombroj en Esperanto, la lernanto povas sufiĉe facile diveni la signifon de ĉiu nombro, ĉar ili similas al nombroj en la franca aŭ en alia lingvo konata de la lernanto. Tion ni povas fari ankaŭ por enkonduki la vorto-finaĵojn donante ekzemplojn kaj demandante al la lernanto trovi la regulojn.

Per tiaj ekzercoj, la lernanto estas pli aktiva en sia lernado kaj pli bone memoras la novajn konojn.

# Realigo de la ekzamenoj

## Prepara laboro

Por realigi la ekzamenon, ni deziris sistemon, kiu ebligas korektadon per retpoŝto. Do, ne eblus taksu la kompetenton de la lernantoj kadre de parola produktado. Ni tamen povis realigi skriban parton (kompreno kaj produktado) kaj ankaŭ parolan komprenon.

Ambaŭ ekzamenoj (A1 kaj A2) estas do dividitaj en tri partojn:

### **Aŭda kompreno (25 poentoj)**

Tiu ĉi parto enhavas mallongajn sonregistrojn, en kiuj aŭdeblas dialogo aŭ monologo, kaj plurajn demandojn, kiuj taksas la komprenon de la lernantoj. Kelkaj demandoj proponas 3 elektojn kiel respondojn (tiuj demandoj donas po unu poenton al la lernanto) kaj por aliaj demandoj, la lernanto devas mem trovi la respondon (tiuj demandoj donas po du poentojn).

### **Skriba kompreno (25 poentoj)**

En tiu ĉi parto, la lernanto povas legi diversajn dokumentojn (afiŝojn, leterojn, anoncojn en gazeto) kaj devas respondi al diversaj demandoj por montri ĉu li/ŝi komprenis la dokumenton. La demandoj, kiuj proponas 3 malsamajn respondojn alportas po unu poenton al la lernanto kaj tiuj, kiuj ne proponas eblon alportas po 2 poentojn.

### **Skriba produktado (25 poentoj)**

En tiu ĉi parto, la lernanto devas verki 2 dokumentojn (ĉu dialogon, ĉu leteron/poŝtkarton) kaj ĉiu dokumento alportas 10 aŭ 15 poentojn.

Tiuj ekzercoj (por la A1 kaj A2 ekzamenoj) estis verkitaj de Noémie Bourgouin kaj Marcelle Provost. Kiel modelojn, ili uzis diversajn ekzamenojn uzatajn por taksu la francan nivelon de la lernantoj je la niveloj A1 kaj A2.

Por la aŭda kompreno, ni deziris diversajn voĉojn el diversaj landoj. Estas ja grave, ke la sondokumentoj estu kiel eble plej internaciaj. Pro tio, ni deziras danki al Vida, Monika, Patrick, Rafael, Agnès kaj Noémie, kiuj registris la diversajn tekstojn de niaj ekzamenoj.

## Kiel provizi poentojn plej juste?

Pri la du unuaj partoj (aŭda kaj skriba partoj), ĉiu demando alportas 1 aŭ 2 poentojn al la lernantoj. La demandoj, kiuj alportas 2 poentojn estas pli malfacilaj ol tiuj, kiuj alportas nur unu poenton.

Por korekti juste tiajn ekzercojn, estas grave, ke la korektantoj komprenu, ke ili devas taksu la komprenadon de la lernantoj. Do eĉ se lernanto misskribis respondon, la korektanto taksas, ĉu ŝi/li plenumis la petitan taskon kaj donas – aŭ ne donas – al ŝi/li la poentojn.

Korekti la skriban produktadon estas iom pli malfacile, ĉar la korektanto devas taksu plurajn flankojn: ĉu la lernanto komprenis la tekston, ĉu la lingvo estas ĝusta, ĉu la vortprovizo estas ampleksa, ĉu la stilo estas klara, ktp.

Pri tiu tasko, ni petis helpon de Christophe Chazarein, kiu studis instruadon de la franca lingvo kaj kiu bone konas la KER-sistemon. Li verkis tabelon, kiu helpas la korektantojn:

<b>Komunika efikeco</b>							
Povas uzi simplajn ĝentilajn diraĵojn (por saluti, danki, ĝisi) adaptitajn al sia kunparolanto	0	0,5	1	1,5	2		
Povas respondi simplajn demandojn pri si kaj pri konkretaj bezonoj	0	0,5	1	1,5	2	2,5	3

<b>Lingva ĝusteco</b>					
Konas simplajn, izolitajn vortojn aŭ esprimojn pri konkretaj situacioj	0	0,5	1	1,5	
Kapablas sufiĉe bone uzi simplajn gramatikajn formojn (finaĵoj, oftaj prepozicioj, artikoloj, ktp.)	0	0,5	1	1,5	2
Skribas simplajn vortojn sen seriozaj skrib-eraroj (ĉapelitaj literoj, duon-vokaloj, ktp.)	0	0,5	1	1,5	

Per tiu tabelo, lernantoj, kiuj plurfoje faras la saman eraron, ne ricevu plurfoje punon. Ni tiel povas taksi diversajn lernantojn per la sama poento-sistemo.

Plie, ĉar temas pri la komenco de tiuj ekzamenoj, ni petis de iu korektanto, Kris Kezer, ke ŝi kontrolu ĉiujn trapasitajn ekzamenojn, por certigi, ĉu ĉiuj korektaĵoj estas koheraj. Eble ŝi ne faros tion por ĉiam, sed ni unue deziris havi koherajn notojn.

Tio helpas al ni doni al ĉiuj korektantoj precizajn instrukciojn pri kiel korekti per la sama maniero.

# Statistika analizo de la lernoprocezo


## Bezonata tempo por finstudi la kursojn

Ekde aŭgusto 2019, ni uzas sisteman protokolon de tempomezurado por precize registri la lernan daŭron de ĉiu lernanto. La sistemo notas la precizan komenc-momenton de ĉiu paĝo-konsulto kaj la finan momenton post plena studado de la paĝo. Tiel, ni povas kalkuli la bezonatan tempon por ĉiuj paĝoj de la kurso kaj sumigi ilin por scii, kiom da tempo ĉiu lernanto bezonis por finstudi la tutan kurson.

Ekde la enkonduko de tiu ĉi sistemo, 232 lernantoj finstudis la deklecionan kurson, kaj **la meza studa tempo estas 13 horoj** (duono de la lernantoj bezonis malpli ol 13 horojn kaj la alia duono bezonis pli ol 13 horojn).

Ni povas grupigi la lernantojn en intervalo:

### Kiom da horoj por finstudi la deklecionan kurson




*Atentu: ni nombris nur la lernantojn, kiuj finstudis la kurson*

Ni ankaŭ kalkulis la rezultojn por la kurso *Gerda Malaperis*, kiu postulas pli da tempo.

La analizo inkluzivas 74 lernantojn, kaj **la meza tempo por finstudi la kurson estas 28 horoj**.

Sube estas grafikaĵo, kiu montras la nombron da lernantoj laŭ la nombro da horoj bezonataj por finstudi la kurson.


### Kiom da horoj por finstudi la kurson "Gerda Malaperis"



Same, ni povas kalkuli, kiom da tagoj la lernantoj bezonas inter la komenco kaj la fino de la kurso, konsiderante, ke ili povas lerni laŭ sia propra ritmo.


**La meza valoro estas 7 semajnoj** – preskaŭ 2 monatoj – kaj ni povas grupigi la lernantojn laŭ la nombro da semajnoj bezonataj por finstudi la deklecionan kurson:

### Semajnoj inter komenco kaj fino de la dek leciona kurso



Eblas konstati, ke kelkaj lernantoj bezonas pli ol unu jaron por finstudi la kurson.

Kaj por la kurso Gerda Malaperis:



La meza daŭro por finstudi la kurson estas 23 semajnoj, t.e. po unu semajno por ĉiu leciono.

## Evoluo de la nombro da lernantoj laŭ la jaroj

De 2003, kiam ni komencis registri diversajn informojn en datumbazo, ni ricevis pli ol 10 000 lernantojn, kiuj aliĝis al la kurso. Sed nur 19% el ili sukcesis finstudi la kurson.

Dum la lastaj jaroj, rilate al la kurso DLEK, la statistikoj indikas, ke la nombro da aliĝintoj estis alta, sed nur malalta proporcio de la lernantoj sukcesis fini la kurson. Jen, por ĉiu jaro, la nombroj da homoj, kiuj aliĝis al la kurso kaj kiuj finstudis ĝin:

	Dekleciona kurso			kurso Gerda Malaperis		
	Aliĝis	Finstudis	Procento	Aliĝis	Finstudis	Procento
2016	213	61	28,64%	36	11	30,56%
2017	670	114	17,01%	115	38	33,04%
2018	502	106	21,12%	103	35	33,98%
2019	373	99	26,54%	84	29	34,52%
2020	365	85	23,29%	105	34	32,38%
2021	189	51	26,98%	58	14	24,14%
2022	212	41	19,34%	48	10	20,83%
2023	160	43	26,88%	53	15	28,30%
2024	133	19	14,29%	35	5	14,29%

Laŭ la disponeblaj statistikoj, ni povas observi, ke, ekde la lanĉo de la kurso “Duolingo” en julio 2020, la nombro da aliĝantoj al la dekleciana kurso, draste malkreskis. Kelkfoje, fama Jutubisto aŭ alia amaskomunikilo varbas en Francio por Esperanto kaj tiam, ni ricevas multe da novaj lernantoj. Tamen, tiuj novaj lernantoj ofte estas malpli motivitaj ol aliaj lernantoj, kaj la procento de tiuj, kiuj sukcesis finstudi la kurson spegulas tion (ekzemple, kiel observite en la jaro 2017).

Por la kurso *Gerda malaperis*, la statistikoj ne tiom varias kaj la procento de lernantoj, kiuj finstudas estas pli alta (kvankam la kurso enhavas pli da lecionoj). Kompreneble, post la unuaj paŝoj, la lernantoj estas pli motivitaj por finstudi la kurson. Ni ankaŭ konstatas, ke la lernantoj bezonas multe da tempo por finstudi la kurson, kaj tio klarigas la procenton de la nuna jaro.


## Taksado de la ekzamenado

Ni publikigis la A1-ekzamenon en februaro 2022.

Ĝis nun (en novembro 2024), 113 lernintoj de la baza kurso trapasis la A1-nivelan ekzamenon fine de la dekleciana kurso (baza kurso).


El tiuj 113 lernintoj, 99% atingis la 37,5 poentojn por sukcese trapasi la ekzamenon.

Jen grafikaĵo, kiu montras kiom da lernantoj atingis iun noton. La averaĝo estas 60 poentoj (el 75).



La A2-ekzameno estis publikigita en marto 2022.

29 lernintoj trapasis la A2-ekzamenon fine de la kurso *Gerda malaperis* kaj ĉiuj sukcesis ĝin. Jen kiel la notoj distribuiĝas:



# Analizo de la rezultoj

En tiu ĉi sekcio, ni prezentos analizon de la tempo necesa por atingi lingvajn kompetentecojn en la niveloj A1 kaj A2. Nia esploro fokusiĝos sur du ĉefaj aspektoj: la lernotempo en nia lingva kurso kaj komparo kun similaj lernoprocezoj en aliaj lingvoj.

## Komparo de la tempo bezonata por atingi la nivelojn A1 kaj A2

La ekzamenoj pri lingvaj kompetentecoj (A1 kaj A2) estas haveblaj por plej diversaj lingvoj. Multaj lernejoj – ĉu en la lerneja sistemo, ĉu lingvo-lernejoj gvidataj de entreprenoj aŭ institucioj – proponas lingvo-kursojn kaj ekzamenojn, plej ofte laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

Lernantoj kaj studmanieroj estas tre diversaj: de lernantoj en bazlernejo aŭ mezlernejo ĝis plenkreskuloj, kiuj studas por sia laboro – ĝenerale devige – aŭ por sia plezuro aŭ kiel hobiaĵo, ĉu per intensaj kursoj aŭ dum longa tempo, ĉu per privataj lecionoj, ĉu en grupo aŭ en klaso, aŭ per memlernado.

Tial la studotempo necesa por atingi iun nivelon estas varia, depende ankaŭ de pluraj faktoroj: individuaj kapabloj, lingva antaŭscio, lernometodoj, ktp.

Ni konsideris diversajn fontojn, inkluzive la programon de la franca lerneja sistemo kaj raportojn de kelkaj ĉefaj institutoj pri lingvoj.

En francaj lernejoj, la nivelo A2 estas atingebla post 4 jaroj. La lingvolernado okazas jene:

- Bazlernejo (dum la du lastaj jaroj, lernantoj komencas lerni fremdan lingvon): 54 horojn jare, entute 108 horojn por atingi A1-nivelon;
- Mezlernejo:
  - Unua jaro: 144 horojn
  - Dua jaro: 108 horojn por atingi la nivelon A2.

La lernantoj do bezonas 108 horojn da lecionoj por atingi la nivelon A1 kaj 252 pliajn horojn por atingi la nivelon A2, do entute 360 horojn de la komenco ĝis la nivelo A2. Al tiuj lecionoj, oni devas aldoni la personan studadon hejme.

En lingvo-lernejoj por plenkreskuloj, la indikoj estas diversaj kaj dependas de la tipoj de la proponitaj kursoj. Iuj lernejoj donas malsimilajn indikojn laŭ la kurso elektita: homo, kiu sekvas intensan kurson ĝenerale atingos sian celon en malpli da lecionoj ol tiu, kiu sekvas nur unu lecionon ĉiusemajne.

Ĝenerale, tio reprezentas 70 ĝis 120 horojn da lecionoj por atingi la nivelon A1, kaj entute 180 ĝis 360 horojn da lecionoj por atingi la nivelon A2.<sup>7</sup>

Eĉ se estas malsimile laŭ la kurso kaj laŭ la homoj, ni tamen povas vidi, ke estas pli ol por Esperanto.

---

<sup>7</sup> <https://www.flcformation.fr/combien-de-temps-faut-il-pour-apprendre-une-nouvelle-langue/>

## Komparo de la sukceso en la ekzamenoj

Nia esploro celas kompari la sukceson en la lernado de Esperanto kaj en lernado de aliaj fremdaj lingvoj. Por tio, ni devas trovi, kiom da homoj sukcesas en la ekzamenoj, por kompari la efikecon de lernado de Esperanto kun tiu de aliaj lingvoj. Bedaŭrinde, la lingvo-institutoj preskaŭ neniam publikigas tiajn informojn. Ankaŭ en la franca lerneja sistemo, tiaj statistikoj ne estas troveblaj, ĉar lingvaj ekzamenoj en la niveloj A1 kaj A2 ne estas planitaj en la lerneja programo.

Tamen oni povas demandi sin, ĉu kompari la rezultojn en la ekzamenoj A1 kaj A2 gravas por taksu ĉu lerni kaj regi Esperanton estas pli rapide, kaj ĝis kia grado, ol lerni aliajn fremdajn lingvojn.

Eble estus pli utile kompari rezultojn pri superaj niveloj, kiel B1, B2 aŭ C1, kaj analizoj devus konsideri similajn grupojn. Niajn retkursojn sekvas ĉefe plenkreskuloj kun propra intereso studi, do iliaj situacioj kaj motivoj tute malsimilas al tiuj de infanoj, kiuj devige studas lingvon en lernejo.

Aldone, plenkreskuloj verŝajne jam havas sperton pri aliaj lingvoj, almenaŭ ĉar ili lernis kelkajn en lernejo, dum infanoj ofte eklernas novan lingvon por la unua fojo.

# Konkludo kaj onta perspektivo

## Komparo de Esperanto kun aliaj lingvoj

La ekzamenoj en niaj retaj kursoj estas disponeblaj de du jaroj, do ni jam havas sufiĉe da rezultoj por analizi, kiel la lernado de Esperanto kompareblas kun tiu de aliaj lingvoj.

Ni ofte legis en diversaj prezentoj pri Esperanto, por ĝenerala publiko aŭ por ĵurnalistoj, asertojn pri la facileco de Esperanto, kompare kun aliaj lingvoj. Laŭ tiuj dokumentoj, Esperanto estas ok ĝis dekoble pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj. Tiaj asertoj troveblas en kelkaj dokumentoj, inkluzive de Vikipedio.

Laŭ nia sperto, ni povas konstati, ke se ni konsideras, ke lernantoj studis dum 14 horoj por atingi la nivelon A1, tio estas ĉirkaŭ dekoble pli rapide ol por aliaj lingvoj, laŭ la indikoj, kiujn ni donis en la antaŭa parto. Tamen, analizi la rezultojn por la A1-ekzamenoj eble ne sufiĉas por definitive konkludi pri la rapideco lerni Esperanton kompare kun aliaj lingvoj.

Same por la A2-ekzameno, ni povas konstati, ke post averaĝe 28 horoj, la lernantoj atingas la saman nivelon kiel tiun atingeblan post lernado de alia lingvo dum dekoble pli da tempo.

Pri la horoj da lernado, indas tamen esti singardaj: nia sistemo registras la tempon, kiun ĉiu lernanto pasigas sur ĉiu paĝo, sed la tempo antaŭ la komputilo ne reflektas la tutan studotempon. Krom tio, la lernanto pasigas tempon lernante vortojn kaj ankaŭ uzante aliajn lernilojn, kaj interrilatante kun sia korektanto aŭ aliaj esperantistoj. Tamen, la problemo pri preciza kalkulo de la studtempo estas sama por ĉiuj kursoj. Indikoj pri la nombro da horoj bezonataj ne donas la tutan tempon dediĉitan al la studado, inkluzive tempon uzatan por praktiki la lingvon ekster la kurso.

Aliaj gravaj punktoj en tiu komparado estas la denaska lingvo de la lernanto kaj la aliaj studataj lingvoj. Ekzemple, por francoj, estas multe pli rapide lerni la italan ol la japanan. Aliflanke, estas sufiĉe facile por francoj lerni Esperanton, ĉar pro la latinidaj radikoj, multaj vortoj estas facile kompreneblaj. Ekzistas ankaŭ aliaj aspektoj, kiuj povas influi la rezultojn, ekzemple la kapabloj kaj motivoj de la lernanto aŭ la metodoj kaj la manieroj lerni (ĉiuj ne estas egalaj).

En sia libro “Esperanto sen mitoj”<sup>8</sup>, Ziko Marcus Sikosek raportas pri diversaj eksperimentoj, kies celoj estis kompari la rapidecon lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn. Laŭ li, Esperanto estas du kaj duono ĝis okoble pli rapide lernebla ol aliaj lingvoj, tamen la aŭtoroj aldonas, ke oni estu singarda, kiam oni komparas, ekzemple, rezultojn de homoj kun malsamaj kapabloj, emoj kaj lingvoscioj.

Ni do vidas, ke malfacile estas doni taŭgan indikon pri la rapideco lerni Esperanton kompare kun aliaj lingvoj. Sed ni ne forgesu, ke tiu argumento, kiun esperantistoj ŝatas prezenti, ne estas tiom grava motivo por la ĝenerala publiko. Indas ankaŭ konsideri, kiom gravas rapideco en la proceso de efika lernado. Ni ne forgesu ankaŭ, ke iuj lingvoj povas esti rapide lerneblaj je la komenco sed poste postulas multe pli da tempo por regi pli kompleksajn regulojn. Tial

---

<sup>8</sup> [https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto\\_sen\\_mitoj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto_sen_mitoj)

por kompari la rapidecon lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn, eble indas studi la rezultojn de altnivelaj ekzamenoj.

## Kiel plibonigi niajn kursojn

Kompari la rapidecon lerni Esperanton kaj aliajn lingvojn ne estas la plej grava celo de la enkonduko de novaj ekzamenoj en niajn retajn kursojn.

La KER-sistemo ne rilatas nur al la ekzameno sed al la tuta kurso. Sekvante la priskribon de la kapabloj postulataj por ĉiu nivelo, ni ne nur preparos lernantojn por la ekzamenoj – fakte tio ne estas la fina celo – sed ni donos al ili pli praktikajn kapablojn en la lingvo, kaj eĉ ebligos al ili pli facile lerni aliajn lingvojn poste.

Kiel ni skribis en nia enkonduko, niaj retaj kursoj baziĝas sur sufiĉe malnova kurso. Ni iom post iom plibonigis ĝin, tamen estas multaj aferoj plibonigendaj. Krom la priskribo de la kompetentoj prilaborigendaj por ĉiu KER-nivelo, ni jam ricevis rimarkojn de la lernantoj, kiuj diras, en kiuj partoj ili trafis malfacilaĵojn.

### Pedagogiaj plibonigoj

Diversaj pedagogiaj strategioj ebligas plibonigon de nia kurso: forigi enhavon neesencan por la niveloj A1 kaj A2, aldoni ekzercojn, kiuj helpas la lernantojn alkutimiĝi al aŭda komprenado, kaj enkonduki ekzercojn, kiuj faciligos al lernantoj malkovri novajn regulojn, anstataŭ simple ricevi klarigojn.

Unue, ni povas forigi de la kurso vortojn kaj gramatikaĵojn, kiuj ne utilas por la A1-nivelo kaj kiuj malfaciligas la kursojn. Jen du ekzemploj de tiaj partoj.

**Korelativoj.** Tradicie, kursoj por komencantoj enkondukas la tutan tabelon de korelativoj por montri la koheran strukturon de tiuj vortetoj en Esperanto. Kvankam tio havas pedagogian valoron, ĝi ofte troŝarĝas lernantojn en fruaj fazoj. Tiam eblas reliefigi nur la plej uzatajn korelativojn, sed en nia kurso, la ekzercoj pri korelativoj rilatas al la tuta enhavo. En la DLEK-kurso, la tuta tabelo aperas en la kvina leciono, kio povas doni al la lernantoj la impreson, ke Esperanto ne estas tre facila. Por solvi tion, ni jam komencis enkonduki la plej ofte uzatajn korelativojn en la unuaj lecionoj. La sekva paŝo estos forigi la malpli ofte uzatajn korelativojn. Tio ne nur malpezigos la kurson, sed ankaŭ permesos pli intensan trejnadon pri la plej utilaj korelativoj.

**Afiksoj.** Simile al la korelativoj, la kurso enkondukas ĉiujn afiksojn por montri kiom facile estas krei novajn vortojn en Esperanto per tiuj elementoj. Sed tio pezigas la lecionon kaj instigas la lernanton parkerigi elementojn, kiuj ne baldaŭ utilos. Ni opinias, ke en kurso de nivelo A1, prefereble ni enkondukos nur la plej oftajn afiksojn.

La dua etapo por plibonigi la kursojn konsistos el aldono de ekzercoj pri aŭda komprenado. Ni jam faris tion en la unua leciono, kaj tion lernantoj multe ŝatas. Ni do plu iros tiudirekten, aldonante tiajn ekzercojn en la postaj lecionoj.

Nova tipo de ekzerco konsistos el enkonduko de novaj vortoj aŭ gramatikaĵoj per taskoj aŭ ludoj, kiuj instigos **la lernantojn memstare malkovri ilin**. Ni jam parolis pri tio en antaŭa ĉapitro kaj donis la ekzemplon pri nombroj. Ni facile povas uzi tian ekzercon por enkonduki

novajn vortojn sen doni tradukojn, sed donante la etimologion de tiuj vortoj. Ekzemple: peti de la lernantoj trovi, kiuj esperantaj vortoj venas de la angla "to learn", de la germana "Kellner" aŭ de la franca "café". Samtipa ekzerco povas utili ankaŭ por klarigi kiel prononci vortojn en Esperanto: la lernanto unue aŭdas vortojn en Esperanto kaj poste devas noti, kiuj sonoj ekzistas en lia/ŝia gepatra lingvo kaj kiuj malsimilas.

**Kiam la lernantoj "malkovras" regulojn, ili pli bone memoras ilin ol kiam oni instruas al ili.**

Alia flanko de la plibonigado estos ankaŭ adapti la vortprovizojn, tekstojn, ekzercojn al la kompetentoj celataj por ĉiu KER-nivelo. Kaj proponi konkretajn situaciojn por komuniki (telefonlvoko, babilado en restoracio, mendo en vendejo ktp.)

Kiel menciite en tiu ĉi dokumento, la aldono de A1- kaj A2-nivelaj ekzamenoj al niaj kursoj estas grava paŝo en ilia evoluo. Tio montras al ni novajn vojojn por daŭre plibonigi kaj adapti ĝin al modernaj instrupraktikoj, similaj al tiuj de aliaj lingvoj.

# Apendico: Lerta metodo por realigo de projektoj

Kiel komputilistoj, ni kutimas labori uzante lertan metodon (Agile Method). Tiu metodo ebligas krei utilajn projektojn. Estas diversaj flankoj de la metodo kaj estas devigata uzi ĉiujn ilojn. Ni tamen prezentas en tiu raporto, kiujn utilajn labormanierojn ni uzis.


## La uzantoj scias kion ili bezonas

Kiam ni klopodis plibonigi la kurson en 2016, ni unue aldonis formularon je la fino de ĉiu leciono por scii ĉu la leciono plaĉis (aŭ ne) al la lernantoj. Per tiu formularo, ni ricevis multajn reagojn de lernantoj, kiuj laŭdis la kurson kaj aliaj, kiuj indikis al ni korektendaĵojn (kelkaj eraretoj jam estis en la kurso de pli ol 15 jaroj kaj neniu ankoraŭ rimarkigis ilin!). Tiel la lernantoj kutimiĝis rilati kun ni kaj kelkaj proponis trafajn ideojn, kiujn ni realigis poste (ekzemple, la “sistema ripetado” estis ideo de iu lernanto, kiun ni realigis). Kaj kiam la servilo paneas aŭ iu cimo aperas, lernantoj ofte kaj rapide informas nin.

## Ne perfekta tuj, sed uzebla unue

Por kelkaj funkcioj de la retejo, ni scias, ke tio postulos multe da tempo por realigi. Kaj tio povas malmotivi nin se ni bezonas plurajn monatojn antaŭ ol vidi la rezulton (kaj kelkfoje, la rezulto ne estas tiom utila kiom ni esperis). Pro tio, ni realigas kaj publikigas funkciojn iom post iom kaj rigardas la reagojn de la uzantoj.

Jen komparo kun realigo de transportilo. Se vi deziras fabriki aŭton, vi povas fabriki tutan aŭton, sed vi devos atendi, ke ĝi estos finita por uzi ĝin. Sed se vi komencas fabriki simplan veturilon, provas tion, kion vi realigis, iom post iom, vi povas pli rapide uzi ĝin, kaj korekti tion, kio ne funkcias. Per tiu procezo, vi povas uzi vian veturilon sen atendi la finan produkton, kiu enhavas ĉiujn funkciojn. Eble, vi eĉ ne bezonos krei tutan aŭton se biciklo sufiĉas al vi...



## Listigi ĉiujn ideojn, elekti la plej utilajn unue

Kiel ni jam diris, niaj lernantoj (kaj la korektantoj) ofte proponas ideojn por plibonigi la kursojn. Ni neniam rifuzas ideojn kaj ni listigas ĉion, kion ni ricevis en liston tie:

<https://github.com/axel584/ikurso/issues>

Kiam ni deziras krei novan version de la retejo, ni elektas kelkajn ideojn de tiu listo, tiujn kiuj ŝajnas al ni plej utilaj por la kurso, kaj ni realigas ilin.

## Bibliografio / Eksteraj ligiloj

RITE: <https://edukado.net/klerigejo/rite>

*Manlibro pri instruado de Esperanto* (ILEI, 2020)

Ekzamenspecimenoj por niveloj B1, B2 kaj C1:

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj>

Ekzameno A1-nivela: <https://ikurso.esperanto-france.org/fr/cge/lec10.php>

Ekzameno A2-nivela: [https://ikurso.esperanto-france.org/fr/gerda/ekzameno\\_a2.php](https://ikurso.esperanto-france.org/fr/gerda/ekzameno_a2.php)

KER-sistemo:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna\\_E%C5%ADropa\\_Referenckadro\\_por\\_Lingvoj](https://eo.wikipedia.org/wiki/Komuna_E%C5%ADropa_Referenckadro_por_Lingvoj)

<https://edukado.net/ekzamenoj/ker/priskribo>

KER-niveloj en la francaj mezlernejoj kaj liceoj: <https://www.educadis.fr/soutien-scolaire/soutien-scolaire-e-learning/niveau-langue-a1-a2-b1-b2/>

Programoj en francaj lernejoj:

<https://www.education.gouv.fr/les-horaires-par-cycle-au-college-9884>

Programo de Alliance française (Instituto pri franca instruado):

<https://www.afnormandie.org/notre-ecole/niveaux-et-programmes/>

<https://www.aflyon.org/page-edito-2/parcours-pedagogique-aflyon-selon-le-cecrl/>

Kiom da tempo por lerni novan lingvon (artikolo de lingva lernejo)

<https://www.flcformation.fr/combien-de-temps-faut-il-pour-apprendre-une-nouvelle-langue/>